Exactly because of the powerlessness of the UN in practical situations, some tried to solve world affairs in other ways, especially through negotiations at so-called 'high' and 'top' levels; but little was and is done for (promoting) understanding at the lowest, though most important level - that of ordinary people. (Applause) Formulas for this or that kind of coexistence were launched: peaceful, active or competitive coexistence, or coexistence plain and simple, without any attribute, but no one was willing to cede even a fragment of absolute national sovereignty, nor any acquired rights. Always concern was and is shown for the coexistence of nations, but little or no concern exists for the friendly and peaceful joint-living of people, or ordinary men. (Applause) Of course, there are many ways of coexistence. For example, even wild animals coexist, one next to the other, in the steel cages of zoological gardens. And, perhaps, this is good - perhaps, for wild animals in zoological gardens. But we, Esperantists, are of the opinion that the world is not a zoological garden; we trust that human beings are not savage beasts, and therefore we prefer international collaboration of men in fraternity and freedom to coexistence in cages.

#### HOW LONG WILL IT TAKE ME TO LEARN ESPERANTO ?

This depends on your talent for languages, on your knowledge of other languages and on the time you are willing to spend every day. But an average person should learn enough Esperanto to undertake an interesting correspondence, if she learns only 1/2 hour every day for 14-20 days.

Textbooks recommended for home study are: 'Esperanto for Americans', \$3.50 (contains complete grammar, exercises and dictionaries); 'Teach Yourself Esperanto', \$1.85, (a modern textbook); 'Esperanto Teacher', \$0.60, (very concise); Pocket Dictionary \$1.50; Pronunciation Record \$1.50 (45 rpm with text), Pronunciation Exercise Tape (3 3/4 ips., 2 hours with text), \$8.90. This material is available postage paid from Esperanto Press, Oakville, Ontario. With every textbook ordered you will get a free booklist and a sample copy of the Canadian Esperanto Review.

#### WHICH ESPERANTO PERIODICALS COULD I SUBSCRIBE TO?

There appear more than 100 publications, but beside our Canadian review I would recommend the following for beginners:

'*Esperanto*', organ of Universal Esp. Ass., monthly, with yearbook and addresses of more than 2000 delegates. \$4.50. Published in Holland.

'*Heroldo de Esperanto*', the bi-weekly newspaper, \$4.00.

#### HOW CAN I GET CORRESPONDENTS ?

Ask for questionnaire for international correspondence from Vilma Eichholz, Esperanto House, Oakville, Ontario.

NATIONAL ESPERANTO ORGANIZATIONS:  
Canadian Esperanto Association: Box 344, Oakville, Ontario  
Esperanto League for North America: Meadville, Pa., USA.

## "Vi mem faru ĝin . . ."

Ĉu mia hazarda vizito al la ĉambro de mia koleginino Konjo malkovris krimon? Jen Konjo, kun ruĝaj makuloj sur la bluzo. Aliaj ruĝaj makuloj estis ankoraŭ malsekaj sur la tapiŝo. Murdo!

"Ne timu. Oni ne trapikis min."

"Sed kio okazis?" - Ne, la grandaj ruĝaj makuloj ne estis el sango.

"Mi volis ŝpari monon. Vidu, kiel mi ŝparis. Vi konas tiujn ĉi ruĝajn ŝuojn. Ili perfekte taŭgas kuu miaj ruĝaj jupo kaj jakoj. Sed ili komencis aspekti tre malnovaj, aĉe sensurfacaj, velkintaj, palaj . . . ."

"Tiel ili ne aspektas nun. Ili montras multajn interesajn nuancojn de ruĝo . . ."

"Bedaŭrinde jes. Nu, mi ne deziras ĉi-sezone aĉeti novajn ŝuojn; do mi decidis, ke mi aĉetos tiun ĉi kolorigilon . . ." - ŝi montris malgrandan botelon, kies korko estis rompita kaj sur kies ŝultroj fluis ruĝaj riveretoj; - kaj mi mem rekolorigos la ŝuojn."

"Vi mem faru ĝin, - jes, laŭ la nuna modo."

"Kaj nun mi detaligos al vi, Manjo, precize kiel mi ŝparis mian monon. Unue, mi ne sukcesis fortiri la korkon. Ĝi sidis tro malalte en la botelo. Do, mi komencis fosi per mia ungfajlilo, kaj rompis la fajlilon. Mi transiris al la tondilo, kaj per tiu klingo mi ja elfosis la korkon; sed ĝi eliris tiel subite, ke multa kolorigilo makulis mian bluzon. Mi panikis, kaj provis rapide forviŝi la makulojn per naztuko . . . . Nur poste, mi rimarkis ke mi uzas mian plej belan puntborderitan naztukon!"

"Do, vi malprofitis je unu ungfajlilo, unu altkvalita naztuko . . ."

"... Kaj unu sufiĉe bona bluzo ankaŭ, ĉar mi tre dubas, ĉu mi sukcesos purigi ĝin. Mi poste vidis, ke kelkaj gutoj makulis ankaŭ la tapiŝon. Tiujn mi espereble povos forigi per speciala sapo, sed kostos multan laboron."

"... kaj la sapon. Sed finfine vi ja rekolorigis viajn ŝuojn, ĉu ne?"

"N-jes!" Konjo respondis, tuj klarigante la iom anomalian vorton per: "Iasence . . . sed ne sukcese. Vidu kiel multnuanca estas la koloro diversloke. Laŭla instrukcioj, mi devis kolorigi la tutan ŝuon samtempe, kiel eble plej rapide. Mi devis iri kaj lavi la manojn; mi prenis puran naztukon kaj pecon da vato, revenis, trempis molan objekton ĉe la buŝo de la botelo . . . kaj vidis, ke mi erare uzis la novan naztukon!"

"Ho, Konjo!"

"Nu, akcidentoj neniam okazas unuope. Ung-fajlilo, du bonaj naztukoj, unu bluzo kaj la tapiŝo. Mi rimarkis mian eraron, nur kiam mi estis jam farbinta parton de la ŝuo. Mi volis savi, se eble, la duan naztukon per tuja eklavo . . . kuris al la banĉambro . . . revenis . . . daŭrigis la farbadon

la alian. Ĉi-foje la telefono sonoris. Mi ne volis ke la farbo denove mal-egaligû; do, mi provis daŭre farbi dum mi parolis en la telefonon. Rezulte: tri ruĝaj makuloj ankaŭ sur mia jupo! Estis mia fratino, kiu bezonis la adreson de geonkloj, kiuj ferias. Kaj nun, kompreneble, vi trovos du-tri sangajn fingrospurojn sur mia adreslibro!”

“Tre interese por detektivo.”

“Jes... se mi estos arestita pro suspekto pri murdo, vi scias kial. Mi faligis la ŝuon kaj vaton por serĉi la adreson; jen la kaŭzo de tiuj du makuloj sur la linoleumo. Kiam mi povis repreni ilin, la nove farbita parto jam estis seka; denove la koloro iĝis malegala. Mi provis duan farbadon, kaj vi vidas la rezulton. Dek nuancoj de ruĝo; kaj la ŝuoj tute ne estas uzeblaj. Do, Manjo, vidu, kiel mi ŝparis monon, kolorigante miajn proprajn ŝuojn!”

MARJORIE BOULTON

## ESPERANTAJ GAZETOJ

La plej novaj numeroj de la sekvantaj Esperanto-gazetoj estas prunte haveblaj ĉe Conrad Fisher, sekretario de ELNA.

Argentina Esperantisto (mimeo.)

Australian Esperantist, The

Belga Esperantisto

Bulteno Gepatra

Dansk Esperanto-Blad

De Esperantist

Dekkvara de Julio (mimeo.)

Dia Regno

El Popola Ĉinio

Esperanta Finnlando

Esperanto (U.E.A.)

Esperanto (Czech. mimeo.)

Esperanto en Skotlando (mimeo.)

Espero Katolika

Germana Esperanto Revuo

Glumark-Kolektanto, La

Ĝusta Vojo, La

Heroldo de Esperanto

Informilo de Internacia Esperanto-

Muzeo en Wien (mimeo.)

Internacia Fervojisto, La

Intersteno

Jugoslavia Esperantisto

Kooperativismo

Kvakeria Esperantisto, La (mimeo.)

Lampiro, La (mimeo.)

Migranto, La

Movado, La (mimeo.)

Mondcivitano, La (mimeo. in Engl.)

Nederlanda Esperantisto

New Zealand Esperantist

Nia Ligilo (Israela, mimeo.)

Nica Literatura Revuo, La

Norvega Esperantisto

Nuntempa Bulgario

Oomoto

Paco

Pola Esperantisto

Praktiko, La

Revue Française D'Esperanto

SAT-Amikaro

Semisto

Sennaciulo

Usona Skolta Revuo

Vivo kaj Sano

Vojo-Vero-Vivo

Worker Esperantist, The



## **La Internacia Federacio Esperantista Fervojista (I.F.E.F.)**

IFEF estas fondita la 4-an de aŭgusto 1948 en Amsterdamo, Nederlando. Ĝi fakte estas naskita el la Internacia Federacio de Esperantistoj inter Tramistoj kaj Transportistoj, kiu pro la milito likvidiĝis.

Tuj post la liberigo de Nederlando la iama sekretario de IFETT, la fervoja lokomotivisto Jan Lok el Amsterdamo klopodis restarigi la organizon. Li petis helpon de siaj kunestraranoj en la loka fervojista esperantista grupo 'UNFEG'. La rezulto de la preparoloj estis ke oni decidis unue fondi tutlandan rondon de fervojistaj esperantistoj. Poste instigi eksterlandajn kolegojn fari la samon, kaj tiam intertrakti pri la starigo de internacia organizo.

La plej celtrafa maniero por kontakti kun kolegoj-esperantistoj en propra lando estis presigi alvokon en la monata revuo por la dungitaro de la Nederlanda Fervojaro. Ĝi rezultigis preskaŭ cent sinanoncojn. Tiel en septembro 1946 fondiĝis la Fervojista Esperantista Rondo Nederlanda. La iniciatintoj transdonis la definitivan estradon al kolegoj en Utrecht, por ke ili mem povu sin dediĉi al internacia laboro.

Tio estis malfacila afero tiutempe, ĉar la internacia trafiko ankoraŭ tre malbone funkciis. Tamen oni finfine sukcesis en aŭgusto 1948 fondi la deziratan organizon kun kolegoj el Danio kaj Francio.

En tiu fondkunveno oni decidis ke la strukturo de IFEF estu pure federacia, do ke ĝi konsistu el memstaraj organizoj de fervojistaj esperantistoj, kaj izolaj membroj en landoj kie ne eblas fondi organizon.

La celo de la federacio estas propagandi Esperanton en la koncernaj instancoj fervojaj; interkonatigi kaj interfratigi fervojistojn aktivajn kaj pensiitajn en la tuta mondo, kiu scipovas la lingvon Esperanto. Ĝi estas kultura organizo kaj neŭtrala rilate la politikajn kaj religiajn konceptojn de la membroj. Ĝi klopodas atingi sian celon per eldono de propraj bulteno kaj fakterminaro; internaciaj renkontiĝoj kaj reciprokaj individuaj vizitoj de la membroj; starigo de vojaĝ-oficejoj pere de la aliĝintaj landaj organizoj kaj instigo al individual korespondado inter la membroj.

Ĉiujare, prefere en majo, ĉar tio estas la plej favora tempo por la fervojistoj, okazas kongreso en unu el la aliĝintaj landoj. La unua kongreso okazis en Danio. Poste sekvis Aŭstrio, Francio, Germanio, Nederlando, Italio, Svisio, Svedio, Jugoslavio, denove Danio kaj Aŭstrio, kaj la lasta en Finnlando. En 1961 Hispanio estas la gastlando kaj en 1962 Hungario.

IFEF nun havas 2500 membrojn, kaj la kongresojn vizitas ĉirkaŭ 400. La celo de la kongresoj estas unualoke preparoli organizajn kaj propagandajn aferojn, sed ni ne forgesas la distran flankon, ĉar por la plej multaj kongresanoj tiu ĉiujara kunveno estas ilia nura eksterlanda vojaĝo.

H. Hoen



HARROGATE: 5-12.VIII-1961  
46-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

## 46-a Universala Kongreso de Esperanto

Harrogate 5.VIII - 12.VIII 1961 Britujo

Korespondadreso: 46-a Universala  
Kongreso de Esperanto - Harrogate.  
Telegrafo: Esperanto Harrogate.  
Banko: Midland Bank Ltd. Harro-  
gate.

Anoncis fakkunvenon:

Internacia Ligo de Esperantistaj In-  
struistoj: publika pedagogia diskuto  
"Edukado por internacia kompreno en  
lernejoj". (Adreso: 183, Woodlands  
Park Road, Birmingham 30, Britujo).

Veterana Esperantista Klubo: "Me-  
morigo pri fruaj agadoj" (Adreso:  
S-ro Lewin, 33 Kingscroft Ave, Dun-  
stable, Britujo).

Internacio de Militrezistantoj. (Adre-  
so: 88 Park Avenue, Enfield, Mddl.,  
Britujo).

Rotaria Klubo. (Adreso: S-ro Mau-  
rice Lewin, 33 Kingscroft Avenue,  
Dunstable, Britujo).

Kristana Esperantista Ligo Inter-  
nacia: "Aktualaj problemoj en la  
mondo". (Adreso: Druivenstraat 32,  
Den Haag, Nederlando).

Se vi intencas veturi al Harrogate,  
b. v. tion anonci al s-ino V. Eichholz,  
Esperanto Domo, Oakville, Ontario.  
Ŝi klopodos aranĝi karavaneton por  
ricevi pli favorajn flugprezojn.

## INAŬGURO DE LA MELBURNA ESPERANTO-DOMO.

Vendrede, la 12-a de Aŭgusto 1960  
restos por ĉiam memorinda tago en  
la historio de la Aŭstralia Esperanto-  
movado, ĉar estis je ĉi tiu dato ke la  
unua Esperanto-Domo en Aŭstralio  
estis malfermata.

42 gesamideanoj ĉeestis la malfer-  
mon de la domo, kiu apartenas al  
Ko-operativo de Melburnaj E-istoj.  
Inter la partoprenantoj ni ĝojis saluti  
la Prezidanton de la Sydney E-  
Societo (S-anon J. Matasin), kiu  
speciale veturis al Melburno por  
ĉeesti la feston.

Belaj floroj ornamis ĉiun ĉambron  
de la domo. Tio estis arte aranĝita  
de S-ino Ryding.

S-ro McKenzie malfermis la kun-  
venon kaj bonvenigis la ĉeestantojn.  
S-ro Matasin, en la nomo de la Syd-  
ney E-Societo, transdonis salutojn kaj  
gratulojn. Li rakontis pri simila  
domo kiun planas la Sidneanoj.

S-ro H. Koppel laŭlegis telegramon  
de S-ro A. Fridenbergs, kiu liber-  
tempis en Kvinslando kaj mem ne  
povis partopreni la feston, kvankam  
estis li kaj lia filino Atika kiuj plej  
forte laboris por la domo. Alia tele-  
gramo venis de la Sydney E-Societo,  
kiu la ĉeestantoj akceptis kun ap-  
laŭdo.

D-ro Fred Williams, kiu formale  
malfermis la domon, alportis la salut-  
ojn de la A.E.A. Prezidanto, S-ano  
Ralph Harry, kiu ne povis persone  
ĉeesti, sed kiu per longa letero sendis  
siajn gratulojn kaj kiu esprimis la  
esperon ke baldaŭ ĉeno da Esperanto-  
Domoj ekzistu tra tuta Aŭstralio.  
D-ro Williams gratulis du "frenez-  
ulojn" (D-ro Fridenbergs kaj H.  
Koppel) kiuj dum la Hobarta Kon-  
greso multe pledis por starigo de  
Esperanto-Domo, kaj li atentigis ke  
el tiu "frenezeco" rezultis la hodiaŭa  
efektivigo de la revo.

Post distribuo de la akcioj de la  
Ko-operativo, S-ro Matasin prezentis  
belegajn lumbildojn, kiujn li faris en  
Hispanujo dum sia mondvojaĝo. Luk-  
sa vespermanĝo finis tiun memorin-  
dan vesperon.

## NOMINATING COMMITTEE

In preparation for the regular election of officers during the ELNA Congress in Seattle this coming July, the following Nominating Committee was named to set up a slate of candidates:

Roland Barta, Chairman, 518 W. 13th Ave., Denver 4, Colorado.

Reed Irvine, 9326 Wilmer Street, Silver Spring, Maryland.

Miss Roan Orloff, 31 Nahanton Street, Newton Centre 59, Mass.

Elwyn C. Pollock, 2222 Crest Drive, El Cajon, California.

Glenn Turner, Route 1, Middleton, Wis.

This committee is charged with finding suitable candidates for three posts in the Executive Committee, and the one office of Treasurer, this year.

The Committee will welcome your help in spotlighting especially competent, diligent & communicative persons whom you can persuade to run for office.

Give detailed pertinent information to the Committee as early as possible.

To aid our members in a wise election of officers we will publish together with the slate of candidates a brief statement of experience, past services to the movement & qualifications for the particular candidacy.

The complete slate of candidates must appear in our March-April issue of the REVIEW and the Nominating Committee's report should reach the Editor not later than March 31st.

It should be borne in mind that none of these offices are merely honorary,

but each entails considerable work, responsibility and continual consultation & correspondence in both English & Esperanto.

A. F. Doneis, Chairman,  
ELNA Executive Committee

## Magnetofona sonbendo

Kun la celo instigi la esperantistojn en la tuta mondo aliĝi al la Universala Kongreso kaj por alproksimigi la kongresemulojn al la Kongreslando kaj al la kongrespreparoj, la Loka Kongresa Komitato de Harrogate preparis magnetofonan programon je dispono de ĉiuj Esperanto-Societoj.

La sonbendo daŭras entute 35 minutojn kaj enhavas paroladon de la Generala Sekretario de U.E.A., Prof. I. Lapenna, intervjuojn kun la Prezidanto de L.K.K., S-ro R.W. Hamilton, kaj kun Ges-roj Fighiera, alvokon de la infano Anlucia Delgado kaj mesaĝon de la Urbestro de Harrogate.

En la muzika parto oni povas aŭskulti la faman Sonorilon de Westminster "Big Ben", la popularan arion "Tipperary" en la originala ĝazklasika interpreto de la New Orleans ĝazorkestro de Terry Lightfoot, la "Cent Sakflutoj" ludataj de la Skota Gvardio, la Marŝon n-ro 4 de Elgar ludatan de la Reĝa Filharmonia Orkestro sub la gvidado de Stanley Pope, kaj kanton en Esperanto (la skota melodio "Annie Laurie") de la Temple Street Methodist junulara ĥoro.

La sonbendo estas eldonita en pluraj ekzempleroj, principe unu por ĉiu lando, kaj estas ricevebla mendante ĝin per simpla poŝtkarto al: 46-a Universala Kongreso de Esperanto, Harrogate (Britujo). La disponigo de la sonbendo okazas senpage, sed kontraŭ promeso ne reteni la sonbendon pli ol unu semajnon kaj sendi ĝin je propra zorgo al venonta utiliganto laŭ instrukcioj de la Kongresa Oficejo. Farigo de kopioj de la kongresa sonbendo estas permesata.

Taniĉka Poliŝĉuk, la 9-jara filino de la poeto, mortis la 28an de novembro 1959 sur la radoj de tramo en Taŝkent.

#### Funebro

Nur unu malgranda, terura tempero,  
Nur unu vekiĝo en fraŝa aero,  
Nur unu korpeto sur kota pavimo --  
De strataĉcidento, senkulpa viktimo.  
La cerbo frapita rifuzas kompreni ! ...  
La nervoj streĉitaj ne povas elteni ! ...  
Kapeto rompita... maneto ĉe l' sino ...  
Kaj rozoj el sango de mia filino ! ...  
Ho, Tanja ! Ho, Tanja amata, vekigu !  
De l' kot' sangumita rapide levigu,  
Kaj iru al viaj gepatroj mizeraj --  
Al ni, kinj perdis la lastan esperon !  
Sed vane ni krias, kaj vokas, kaj ĝemas ...  
Neniam filino amata revenos.  
Estingis la radoj, de l' vivo fajron,  
Kaj ŝian ĉerketon-englutis la tero ! ...

Petro Poliŝĉuk

The Universal Congress of Esperanto is to be held in Tokio, Japan, in 1965. It is suggested that as the Olympic Games are to be held in Japan that year also, many persons may wish to combine a visit to both events. This is also a good occasion to suggest to sport enthusiasts making plans to visit the Olympics that a knowledge of Esperanto will be especially useful in Japan. The special events always connected with the Universal Esperanto Congresses will afford unusual opportunity to visit the various parts of Japan and get to know our eastern friends.

Panjo, Diru al Mi

Panjo, diru al mi,  
kial stelo falis en nokton,  
kiu surĉiele ekbrilis tiun nokton,  
kiam ekploris mi en la matenon...  
Kial tiu stelo  
al mi ne alportis tagon ?  
Vi, panjo mia, vi tiom ekdeziris,  
ke via fileto feliĉa iru en mondon,  
ke via filo neniam perdiĝu sur stratoj ...

Panjo, diru al mi  
ĉu iam iu alia stelo  
ekbrilos sur ĉielo  
por mi,  
stelo,  
kiu montros al mi  
la vojon al la feliĉo ?

Diru, panjo, diru al mi,  
kial lasis vi,  
ke mia stelo falis en nokton,  
kial lasis vi,  
ke via filo ekvagadis en mondon ...

Damjan Vahen-Svetinov

La 31an de januaro 1961 mortis Victorine Conner 83jara, post longa, doloriga malsano. Ŝi konatiĝis kun Esperanto kiam ŝi estis 77 jara kaj tuj iĝis entuziasma kaj agema lernantino. Antaŭ sia malsano ŝi desegnis belajn esperantajn salutkartojn. Ni memoras ŝin kiel ĉarman, interesplenan amikino.

## Nia Poŝto

El la 'privata letero' de rotariano Norman Williams, 237 Two Trees Lane, Denton, M/C, Anglujo:

Kial Rotarianoj ĉiam portas la Rotarian radon sed Esperantistoj ofte ne portas la Verdan Stelon? Rotarianoj devas ĉeesti kunvenon ĉiusemajne. Se oni ne povas ĉeesti la kunvenon de sia propra klubo oni devas provi ĉeesti la kunvenon de alia klubo. Dum la lern-eja paska ferio mi tion devis fari. Mi elektis klubon hazarde. Ĉe tiu klubo mi elektis sidlokon tute hazarde. Mia nekonata najbaro turnis sin al mi, rimarkis mian verdan stelon kaj parolis al mi Esperantlingve! Li portis la Rotarian radon sed ne la verdan stelon. Se mi ankaŭ estus portinta nur la Rotarian radon, estus okazinta treege malofta afero, du Rotarianoj Esperantistoj sidantaj kune kaj ĉiu ne sciis, ke la alia estas samideano!

Mi ĵus revenis de malgranda Rotaria kunveno. Nekonata membro de alia klubo venis al mi kaj komencis diskuton pri Esperanto. Li min informis, ke li komencis lerni Esperanton en 1932, kaj ke li rekonis la verdan stelon kiun mi ĉiam, ĉie portas. Kredeble estas en la mondo centoj da Rotarianaj Esperantistoj, kies nomoj ne troviĝas sur mia listo.

Noto de la ELNA-sekretario:  
Se vi estas Rotariano, sendu vian nomon kaj adreson al s-ano Williams. Mendu verdstelon po 25 ¢ ĉe mi mem.

## LA ESEKONKURSO DE LA SKOLTA ESPERANTISTA LIGO

De la 1-a de januaro ĝis la 31-a de decembro 1961, la Skolta Esperantista Ligo okazigos sian unuan esekonkurson kun tri monpremioj: Usonaj \$ 25.00, \$ 15.00 kaj \$ 10.00. Ni invitas vin aliĝi al la Skolta Esperantista Ligo (75 ¢ jare) kaj partopreni en nia esekonkurso kies ĝeneralaj temoj sugestitaj estas:

1. Kiel la skoltismo maturigas nian junularon.
2. Skoltoj kiel mondcivitanoj.
3. Kiel sukcesigi la skoltan trupon.

Konkurskondiĉoj:

La konkursanto devas esti membro de la Skolta Esperantista Ligo.

Speciala slipo devas esti alfiksita al la manuskripto kaj sendata al la adreso surpresita.

Ĉiu manuskripto devas esti originala verkaĵo sekvanta la ĝeneralajn temojn supremenciitajn. La manuskripto devas aŭ esti tajpita kaj duoble spacita aŭ povas esti klare manskribita, enhavante minimume 250 vortojn.

Ĉiu manuskripto sendita iĝos la posedaĵo de la Skolta Esperantista Ligo.

Kontaktu C. Stanley Otto,  
20 Harvard Terrace, West Orange, N.J.

*Introduction to*  
**ESPERANTO**  
**THE UNIVERSAL LANGUAGE**  
The Third Edition . . . REVISED . . . Price \$2.00  
Sent on Five Days **FREE Examination!**  
**BOX 792 • PLACERVILLE, CALIF.**

## DEZIRAS KORESPONDI

Kozn Zinovij, Krivoj Rog-11, Kaliningradskaja 6, Kv.27, USSR. - 29-jara, dez.kor., interŝanĝi bildkartojn, poŝtmarkojn, esperantaĵojn, kc.

Bruno Samson, 5037 Christophe-Colomb, Montreal, Kanado. - Dez.kor. kun mezaĝa virino usona.

Y. Koakutsu, 3830 2-Chome, Minami-machi, Nerima-ku, Tokio, Japanio. - Dez.int. unuataĝkovertojn.

Pik Hong Tjie, Djl. Surjatmadjan 3, Jogjakarta (Djawa), Indonezio, - 20-jara, dez. kor.

Dimitâr-Kocev, Sofia 3, Car Simconv 204, Bulgario. - 23-jara pentristo, dez. interŝanĝi librojn, gazetojn.

Josefo Trombitás - Červenany, - p. Sirk okr. Roznava, Ĉeĥoslovakio.

Mirolav Drápal - Olomouc 2 - Str. Matěje z Janova, Ĉeĥoslovakio - PKI; ankaŭ volas kor. kun kanadanoj.

Josefo Illečko - ŠD, Stalino 22 - Prešov - Ĉeĥoslovakio - Juna kuracisto, lingvoj, teatro, muziko, danco.

'Chasseur Mangot Michel' - SP-88.845 (AFN), Algerio. Militiservanto - instruisto - 26-jarulo - korespondus pri edukarto, pedagogio, legado, geografio, civilizacio, nuntempaj naciaj vivadoj tipaj, vojaĝoj.

Arkadiusz Sobczak - St. 11-go Listopada 26/25 - LODZ - Pollando. Pri naturismo, nudismo, 27-jarulo, fraŭlo, ŝohej Suzuki - ĉe Fujita, 101-1, Hiroŝaŭa-ĉjo - Hamamatsu, Japanujo, 21-jara studento. /kemi-studento

Tarisa Bessonova - Moskvo, USSR - B-234, B-459. Fraŭlino, volas kor. kun usonanoj pri diversaj temoj.

Lad. Filka, Bezručova 731, Kufin u Brna, Ĉeĥoslovakio - dez. interŝanĝi bildkartojn.

Edmund Jaan, Abja P R 11, Estonia, USSR - dez. korespondi angle aŭ esperante.

Skûpas Algimantas, 37, Str. Kumunarų, Ŝeduva, Lithuania, USSR.

En marto 1960, okaze de kursfino, aranĝos letervesperon du grandaj esperantaj grupoj de polaj instruistoj ĉe Profesia Asocio de Polaj Instruistoj en Wrocław. Sendu viajn salutkartojn, leterojn, korespondproponojn kaj diverspacajn esperantaĵojn, per kiuj vi helpos propagandi Esperanton en instruistaj medioj kaj varbi novajn adeptojn. Bonvolu skribi amase. Nia adreso: Związek Nauczycielstwa Polskiego, Oddział we Wrocławiu; ul. Nauczycielska 2; Wrocław; Pollando.

## Novaj Libroj

Micja Etulino, de Vinko Möderndorfer. Tr. Drago Kralj. Eldona Sekcio de Slovenia Esp. Ligo, Ljubljana. 16p.

Bahaismo - la religio de Paco, de Lidja Zamenhof. Bahaa Esperanto-Komitato, Heidelberg, Germanujo. 8p.

Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro. Red. Ivo Lapenna. UEA, Rotterdam, Nederlando. 104+16p

William Penn, Proponinto de Europa Parlamento, de Edmond Privat. Kvakera Esperantista Societo, Ventnor. 16p.

Pro unu bovino (rakontoj). Fremdlingva Eldonejo, Hanoi, Vietnam. 268p.

Anekdotoj pri la vivo de Prezidanto Ho Chi Minh, de Tran Dan Tien. Fremdlingva Eldonejo, Hanoi, 130p.

Sude de la 17-a Paralelo, de Quang Loi. Tr Nguyen Minh Kinh. Fremdlingva Eldonejo, Hanoi, 119p.

Miniaturoj, de Geraldo Mattos. Kultura Kooperativo de Esperantistoj, Rio de Janeiro, Brazilo, 77p.

Zamenhof, iniciadoro de Esperanto, de A. Lopez Luna. Tr. C. Domingues. Irmãos Pongetti, Rio de Janeiro, 174p.

Zamenhof, de Ismael Gomes Braga. Nia Stelo. Lisbon. Portugalujo. 65p.

Adresaro de firmoj, CEKIT (Centro por Esperanto en Komerco, Industrio kaj Turismo), Milano. 37p.

Sudtirolo en la jaro 1960, de Hugo Steiner. Bisamberg, Aŭstrio., 63p.

Esperanta resumo de la stenologo kaj stenografio, de Delfi Dalmau. Barcelona, Hispanujo. 16p.

Monto de l' Virino. Fremdlingva Eldonejo, Hanoi, Vietnam. 96p.

Bulgario. Redaktis Bojan Balabanov. Eldonejo de Literaturo en Fremdaj Lingvoj, Sofio. 280p.

Esperanto-Lernolibro, de Venlo Fon. Vol.2. 205p. (vol 1 jam aperis, kun 168p.) Eld. Komerca Presejo (Pekino)

Elektritaj Poemoj, de Castro Alves. Tr. L.H.Knoedt. Universitato de Bahia, Bahia, Brazilo. 186p.

Animo Prisma, de Sylla Chaves. Kultura Koop. de Esperantistoj, Rio de Janeiro. 112p.

4a eŭkaristia esperantista mondkunveno. 20p.

Chave de Esperanto, 4a eld. urugvaja. Urugvaja Esp. Societo., Montevideo. 32p.

Godelieve, la nobelino de Gistel, de F.R.Boschvogel. Fratoj de l' Karitato, Bierbeek, Belgujo. 35p.

Selejang Pandang Bahasa Esperanto, de Liem Tjong Hie. Eld. Indonezia Esp.-Instituto, Semarang. 80p.

Por Senarmiĝo, Por Paco kaj Amikeco Inter La Popoloj. Eldonejo de literaturo en Fremdaj Lingvoj, Sofio. 27p.

Kvar Prelegoj Pri Esperanta Literaturo, de Drago Kralj. Slovenia Esperanto-Ligo. Ljubljana. 189p.

Kantu Kune! de Roman Dobrzynski, Tadeusz Jarzecki. Varsovia Filio de Pola Esp.-Asocio. Varsovio. 48p.

Paca Novaĵo. Internacio de Militrezistantoj. Enfield (Britio). 16p.

Akuzilo Kontraŭ la Krime de Usono-Dziem Rilate al Sudvjatnamaj Intelektuloj. Hanoi. 20p.

Dek Gvidprincipoj de la Oomoto-Movado. Red. Jasuo Sakurai. Oomoto Centra Oficejo, Kameoka, Japanujo. 24

## LOCAL ADDRESSES

The Review lists, without charge, addresses of local Esperanto groups or of Esperantists who want local contacts to form new local groups. It is not necessary that the members of such groups be members of the League. ELNA exists for the purpose of helping all who want to promote Esperanto. If you want advice on forming a local club or study group, write to: Esperanto League for North America, Meadville, Pa.

In case of a group representing some religious, political or other special interest, please state affiliation or special interest. We make no judgment, and accept no responsibility, concerning Esperantist special interest groups but will list addresses (if in North America) so that persons of similar interests may find congenial groups.

### Arkansas:

Tom Haxby, 724 W. Gordon, Harrison

### California:

Esperanto Club of Santa Monica, 855 Franklin St.,  
Santa Monica.

Esperanto-Klubo de Los Angeles, 1237 N. Alexandria  
Ave., Los Angeles 29.

Esperanto-Societo de San Diego, P.O. Box 6215,  
San Diego 6,

Esperanto Society of Sacramento, 5631 Balboa Circle,  
Sacramento

Esperanto Society of San Francisco, 110 Cardenas Ave.  
San Francisco 27. Ju 4-2198.

John Clifford, 750 47th Ave., Capitola.

Napa Esperanto Club, c/o Martha Walker, 2846 Mon-  
ticello Rd., Napa.

Palo Alto Esperanto Class, Room 39, Palo Alto High  
School, 50 Embarcadero Rd., Palo Alto.  
Meets Wed. at 7:30 p.m.

Esperanto in Palo Alto. Instructor, Bruce Kennedy.  
2200 Oakwood Drive, Palo Alto.

Pasadena Esperanto Class, YWCA, 78 N. Marengo Av.

Peninsula Esperanto Club, 410 Darrell Rd., Hillsborough

### Illinois:

Esperanto Society of Chicago, c/o H. Tobusch,  
55 E. Washington, Chicago.

### Massachusetts:

Greenfield Esperanto Committee, 63 Congress St.,  
Greenfield, PR 3 - 7031.

James C. Keating, 323 Nottingham St., Springfield 4  
ST 8-8481

### Montana:

Esperanto Study Group, c/o Bob Davis, 1721 Helen,  
Missoula, LI 9-8182

### New York:

Frances Leshner, 4 West 28th St., New York 1,  
MU 4-6384

### Pennsylvania:

Esperanto Club of the Lehigh Valley, 701 Lechauweki  
Ave., Bethlehem. Corresp. Sec.: Rene Oehler.

Esperanto Study Group, YWCA, Meadville.

Floyd A. Clarke, 1723 Illingsworth Ave., Allentown.  
K.M. Whitten, 3933 Baltimore Ave., Philadelphia 4,  
EV 2-3959.

### Texas:

Esperanto Coterie of Texas, P.O. Box 805, Houston 1  
Jaroslav Kleprik, 1206 Lamar Street, San Antonio.  
CA 3-6624

### Washington:

Seattle Esperanto Society, 3231 West 62nd St.,  
Seattle 7.

### Wisconsin:

Joey Przybilla, P.O. Box 685, Whitehall.

### Canada:

Calgary Esperanto Studrondo, YWCA, Calgary, Alberta  
Christie W. Roberts, Rose Valley, Saskatchewan.

Forest Esperanto Club, Box 421, Forest, Ontario  
Oakville Esperanto Club, Esperanto House, Oakville,  
Ontario. TA 2-9330.

Toronto Esperanto Club, Box 52, Terminal 'A',  
Toronto, Ontario. HU-8-2811

### ORGANIZATIONS:

ELNA Membership and Organization Committee,  
3122 Silva St., Lakewood, Calif.

ELNA youth section: Charles Powell, Route 1, Box 92  
Winauma, Florida.

Internacia Esperanto Muzeo en Wien, US representative,  
William E. Baff, 610 C St. S.E., Washington 3, D.C.

Internacia Ligo de Esp. Instruistoj, US representative,  
George Falgier, 3622 N. Market St. St. Louis 13, Mis.

Internacia Naturista Fakgrupo Esperantista, c/o L. Heil-  
berg, 447 Cole St., San Francisco 17, Calif.

Kvakeria Esperantista Societo, US representative, Donald  
Broadribb, 5615 Woodlawn, Chicago 37, Ill.

Skolta Esperantista Ligo, US Section: C. Stanley Otto,  
20 Harvard Terrace, West Orange, New Jersey.

### BOOK SERVICES:

Esperanto League Book Service, Middleton, Wisconsin.

Esperanta Libro Servo, 2222 Crest Drive, El Cajon, Calif.

Floyd A. Clarke, 1723 Illingsworth Ave., Allentown, Pen  
Esperanto Press, Oakville, Ontario, Canada

Sender:  
ESPERANTO PRESS  
Oakville, Ontario, Canada

Return and Forwarding Postage Guaranteed



## KUNLABORANT(IN)O SERĈATA

Kiu volas profesie labori por Esperanto?  
Pro multaj presmendoj kaj ĝenerala inter-  
esiĝo pri nia lingvo mia entrepreno  
ESPERANTO PRESS bone progresas, sed  
mi nun urĝe bezonas kunlaborant(in)on  
por plenumi la taskojn, kiujn mi trans-  
prenis aŭ por plene profiti el la maŝinaro  
disponebla al nia movado. La persono  
havu sufiĉe da talento por memstare  
gvidi la entreprenon (krom perfekta scio  
de Esperanto necesas konoj pri tajpado,  
librotenado kaj teknika komprenemo por  
lerni ofsetan presadon). La salajro estos  
modesta kaj konforme al la enspezoj.  
La kunlaborant(in)o povas ricevi ĉambreon  
en nia domo kaj vivi kun nia familio.  
Multaj leteroj restas ankoraŭ nerespond-  
itaj sur mia skribotablo. Mi klopodos  
respondi ĉiujn, sed mi ankoraŭ ne povas  
antaŭvidi kiam. Pro tro da laboro ni  
krome ne plu povas akcepti feriajn gas-  
tojn en nia domo, escepte se ili venas  
por helpi nin. Rüdiger Eichholz

## Dua Volumo ESPERANTOLOGIO

*Internacia revuo por la lingvistiko kaj  
bibliografio de Esperanto.*

La reapero de "Esperantologio" es-  
tas grava kultura evento por la tuta  
Esperantista movado. La unua kaj-  
ero jam aperis. La tuta dua volumo  
kovros proksimume tri jarojn.



La abonprezo por la dua volumo en  
Usono estas \$6.00. La jam komplet-  
igita Volumo I havebla je \$5.00.

La usona peranto estas  
R. C. Marble, Box 545,  
Reseda, California

*Sendu monon kaj abonojn NUN  
al la peranto.*

Presita ĉe ESPERANTO PRESS, Oakville, Ont.